

La laboro de la Internacia Civila Helpservo en Grekujo, 2-a parto

Claude Gacond, 82-a radioprelego, 1964.06.24 & 27

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la laboro de Internacia Civila Helpservo en Grekujo. Vi aŭdas Claude Gacond.

Dum la pasinta elsendo mi rakontis, kiel en Servia, urbeto en Makedonio, Internacia Civila Helpservo kapablis krei novajn laboreblecojn per fondo de teksindustrio, kiu montriĝis tre rapide profitdona por la loĝantaro.

Tiu laboro estis akompanata de socia laboro. Kuracistino laboris dum du jaroj kiel distrikta medicinisto. Ŝi respondecis pri tri vilaĝoj, kies loĝantaro sumas 4'500 personojn. En la montaraj vilaĝoj de la regiono la civila servo sendis flegistinojn. Ilia laboro celis plibonigon de la sano kaj sanitaraj servoj, kaj konsilojn pri la nutrado kaj flegado de la suĉinfanoj. Tre rapide montriĝis multaj pozitivaj rezultoj. Ekzemple en unu el tiuj vilaĝoj, kiu posedis antaŭ la alveno de tiuj volontulinoj nur du necesejojn por 2'000 loĝantoj, en du jaroj konstruiĝis fare de la loĝantoj mem pli ol 150 necesejoj. La virinoj lernis kiel steriligi fruktojn por povi ilin manĝi dum la vintro, aŭ fliki vestaĵojn por ilin daŭrigi pli longe.

La civila servo iniciatis en la regiono Servia laborejojn por la replantado de iamaj arbaroj. Inĝeniero desegnis novan planon por la disvolviĝo de la urbeto, por ke la loĝantoj sciu, kie konstrui sian domon, sen ĉiam timi devi malkonstrui ĝin poste, ĉar ĝi troviĝas sur estonta strato. Tio ofte okazis kaj paralizis la konstruadon.

Agronomo venis dum kelkaj monatoj por alporti siajn konsilojn al la montaraj vilaĝanoj. Tiun ĉi aŭtunon, kiam tiu trijara helpo finiĝos, la volontuloj de la civila servo povos forlasi tiun regionon kun vera espero, ĉar la teksta industrio bone progresas kaj la loĝantaro reprenis kuraĝon kaj retrovis laboremon.

Nun ni ekzameni la konkludojn, kiujn provas fari Internacia Civila Helpservo rilate la helpon al subindustriaj regionoj. Ĉar tiu movado nun havas malantaŭ si sufiĉe multajn eksperimentojn, tiuj konkludoj povas helpi ĉiujn, kiuj okupiĝas pri la subevoluintaj landoj aŭ povas interesi junulojn, kiuj akceptus doni unu aŭ eĉ kelkajn jarojn de sia vivo por helpi siajn malpli privilegiitajn fratojn, kiuj loĝas en Grekujo aŭ en aliaj malriĉaj landoj.

La civila servo distingas tri help-nivelejojn : la materian helpon, la edukon, la influon de la mentaleco.

La materia helpo estas la plej simpla. Kiam oni posedas monon, tiam oni povas doni al tiu, kiu troviĝas en mizerego, kiu ne scias kion manĝi. Oni povas konstrui por li domon aŭ eĉ munti fabrikon por alporti al li laboron.

Sed ĉio tio ne havas grandan signifon, se oni ne kapablas eduki la homojn. La mono, kiun oni donas al malsatanto, estas rapide elspezita. Estas pli bone ĝin uzi por doni al tiu malsatanto profesian formadon, kiu al li ebligas poste gajni propran panon kaj fidi je la vivo. La edukado estas eĉ pli esenca, ol la materia helpo. Klera homo havos la eblecon sin materie mem helpi.

Sed la tria punkto estas ankoraŭ pli grava : influi la pensmanieron de la homoj. Se oni donas al iu profesian formadon, ekzemple por kuraci, oni nenion atingis por la progreso de la situacio, se poste tiu kuracisto preferos loĝi en urbo, kie jam troviĝas kuracistoj, anstataŭ malfermi novan kuracejon en la kamparo, kie oni lin atendas. Tio estas vera problemo por Grekujo, kiel por ĉiuj malriĉaj landoj : la kleraj homoj forlasas la kamparon. Aliaj ekzemploj : Vanas konstrui belajn novajn domojn, se iliaj loĝantoj poste ne kapablos taŭge vivi en ili, se ekzemple ĉiuj loĝos en unu sola ĉambro, kiel antaŭe en sia mizera ruino, ĉar ili timas dormi solaj en unu ĉambro, aŭ ĉar ili ne volas lasi siajn infanojn dormi en aparta infana ĉambro. Belaj fabrikoj tute kapablaj bone funkcii bankrotas, ĉar en ili neniu sin sentas respondeca, ĉar oni misuzas la maŝinojn senrespekte.

La laboro de la Internacia Civila Helpservo en Grekujo, 2-a parto

Claude Gacond, 82-a radioprelego, 1964.06.24 & 27

Do estas esence influi la mentalecon de la homoj, kiujn oni volas helpi. Se oni kapablas ilin igi agemaj, de si mem plej ofte, ili serĉos la rimedojn kleriĝi, kaj aŭtomate ilia vivnivelo plialtiĝos, dum sola materia helpo aŭ eĉ nura edukado ne estus tre efikaj. La rilatoj inter la loĝantara pensado kaj la ekonomia kaj socia situacioj estas tiel intimaj, ke izolita agado en unu sola fako ne havas multajn ŝancojn sukcesi.

En siaj estontaj helpoprojektoj Internacia Civila Helpservo do decidis ĉiam komenci per la plej grava flanko de la agado: influi la pensmanieron. Tio estas nature plej malfacila. Oni povas tion atingi nur vivante kun la helpatoj dum jaroj. Sed la civilistoj rimarkis, ke el tio ili mem multon gajnas : ili alportas vivkoncepton, kiu permesas plibonigi la materialan situacion, sed ili konstatas, ke homrilate la grekoj estas multe pli riĉaj ol ni. Do riĉiĝo ne estas nur unusenca, la helpantoj kaj la helpatoj alportas ion.

Granda helpo nun estas studata por valo nomata Duskara. La edukado devos esti multflanka. Do la civila servo elektas vilaĝojn distancajn unu de la aliaj je pli ol unu horo de marŝado, kaj ĉiu ricevos unu el la helpantoj. Tio devigos la vilaĝanojn kaj la helpantojn al konstantaj rilatoj. En unu vilaĝo loĝos agronomo, en la dua flegistino, en la tria instruistino. Kvar laborjaroj estos absolute necesaj por konduki la helpatojn al memhelpado. Por la civila servo tio kelkfoje ŝajnas longa periodo, ĉar estas necese trovi la monon kaj la volontulojn kapablajn funkcii kiel pedagogoj. Por la grekoj tio ŝajnas minuto en ilia vivo, sed ofte minuto estonto-decidiga.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la laboro de Internacia Civila Helpservo.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-